FRANCA KATOLIKA ESPERANTISTO

LA HOUSSAYE EN BRIE
F - 77610 FONTENAY TRESIGNY
FRANCE

★ Organo de FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO, filio de I. K. U. E. ★

(Association Catholique Française pour l'Espéranto)

Prezidanto : S-ro R. Cl. COLAS,- 6, rue de Mézières - 75006 PARIS
Sekr.: S-ro R. DESPINEY,-43,quai de Champagne - 94170 LE PERREUX SUR MARNE
Kasistino : S-ino J. VINCENT, rue des Oiseaux,- 27700 LES ANDELYS

C.C.P.-Association Cath. Franç. pour l'Espéranto - ROUEN - 23 24 93 N.-

=== le N° : 2 Fr-; Abono : 7 Fr,- kotizo : 1 Fr, = sume : 8 Fr,- ====

::

Sendu la materialon por la bulteno al S-ino J. VINCENT, antaŭ la 20-a de marto, junio, septembro kaj decembro.

++

-- N° 103 --- BULLETIN TRIMESTRIEL ------ TRIMONATA BULTENO -------

==========

Sankta PIO-Xa, preĝu por ni .

---- Januaro 1975 ----

==========

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

B I L E T O D E L A P R E Z I D A N T O

Catholiques, Espérantistes, ces deux mots nous réunissent dans une même Association, et c'est à ces deux titres qu'en ce début d'année nous voulons dans ce bulletin adresser nos voeux à tous nos membres, ainsi qu'à nos amis connus et inconnus qui liront ces lignes.

L'an nouveau naît entre les deux célébrations chrétiennes de Noël et de l'Epiphanie; dans ces deux fêtes, communes aux chrétiens de tous lieux et de toutes traditions, nous retrouvons un sujet de méditation sur notre vocation à l'universalisme de notre Mouvement.

La Foi dans le Message de Jésus, l'appartenance à la communauté des baptisés nous rassemblent particulièrement dans la vision de l'Unité du Salut à laquelle l'Evangile nous appelle.

Certes, une unité institutionnelle nous parait lointaine et difficile, mais un lien existe au plan de la Charité, entre ceux qui entendent porter témoignage de la Parole Divine; un rapprochement se dessine entre les chrétiens de diverses confessions. Mais cette marche en avant trouverait un terrain plus favorable si, aux incompréhensions et aux divergences qui font de nous des "frères séparés" ne s'ajoutaient celles qui naissent de la difficulté de communiquer.

L'Espéranto, seule solution ayant l'épreuve du temps et de la pratique pour sortir du cloisonnement linguistique, dont l'expérience se poursuit sur de multiples terrains depuis le début du siècle présent est un moyen privilégié pour la recherche et le contact oecuméniques. Le Congrès de Hambourg 1974 a été une ouverture vers une harmonie et une prière commune dans le total respect des personnalités des uns et des autres.

Nous souhaitons que, au cours de cette année, un effort soit fait pour attirer l'attention et la sympathie de ceux qui sont investis de l'autorité. Ils ne peuvent nier les problèmes humains et psychologiques venant de la diversité des groupes linguistiques dans leurs rencontres.

A nous d'enraciner dans notre génération notre langue, comme langue d'échange, de culture, de progrès et de paix. l'Espéranto ne s'imposera

.../...

.../...
que s'il est utilisé par un grand nombre de pratiquants sincères, nombreux, convaincus : que ce soit le sens de notre effort.

R. CL. COLAS.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

P E R S I S T O

Ho ĉiopova Fonto de la vivo !
Fortecon vian al ni donacadu,
Por ke kuraĝe kaj senŝanceliĝe
Ni ĝoje niajn devojn plenumadu.

Ho Patro kompatema kaj indulga
Pro pekoj ne forlasu filojn viajn
Sed benu ĉiun la Spirito Sankta
Por ke ni amu vin kaj fratojn niajn.

(El Himnaro esperanta N° 161)

M E D I T A D O

Kelkaj animoj planas gravajn projektojn por Nia Sinjoro. Sed la okazo plenumi ilin, eble neniam alvenos ... Tiaj fantaziaĵoj plej ofte nutras nur la vanan kaj kaŝan memestimon !

La tolerado de la tedaj agoj kaj pasioj, tiu rezigno al niaj etaj inklinoj, tiu klopodo kontraŭ niaj malinklinoj ... ĉio ĉi estas pli fruktodona por niaj animoj ol ni pensus, kondice ke la amo al Dio inspiras tion al ni.

(St-François de Sales)

EÙROPA FERIO-SEMAJNO

Depost pluraj jaroj la svisaj fervojistaj esperantistoj organizas, dum la lasta septembra semajno, la jam tre faman Eùropan Ferio-semajnon.

Tiun jaron ĝi okazis en Magliaso en la kantono Tiĉino, kaj nombris 68 partoprenantojn el 11 diversaj nacioj. Ĉiuj loĝis en la belaj ĵus konstruitaj dometoj de la evangelia ripozcentro apud la Lugano-lago en rava kaj kvieta situacio. Dank'al la du afablaj kaj sindonemaj gvidantoj, S-roj Hunkeler kaj Glättli, la ferio-semajno disvolvis siajn arangojn en perfekta sinsekvo.

Matene la partoprenantoj, kiuj deziris tion, ĉeestis unu el la tri kursoj (Komencantoj, dua kaj tria grado) en kiuj ili bone lernis sub la gvidado de s-roj Bächli, Hunkeler kaj Liechti.

Posttagmeze, la aùtobusoj aù la ŝipo kondukis la esperantistojn al la plej belaj vidindaĵoj de Tiĉino, kies tipaj vilaĝoj kuŝas meze de verdaj arbaroj. La partoprenantoj eĉ malkovris en Serpiano papagon, kiu, kvankam tiel verda kiel nia stelo, obstine rifuzis paroli !

La vesperoj estis gajaj kaj multaj ridis en la ludoj, cerbumis por solvi la konkursojn aù plezure rigardis la filmojn faritajn de S-ro Turin en Tarragona kaj Füringen. Ankaù tre interesaj estis la filmoj pri la francaj vagonaroj Mistral, Capitole kaj ĵetvagonaro; finfine multaj ĉeestantoj revis rigardante la belegan filmon de la norvegaj fervojoj, esperante parolantan.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Venonta konsilia kunveno : la 2-an de marto 1975, je la 14.30, - 4 bis, rue de la Cerisaie, Paris-4. - Metrostacio : Bastille.

Iu ajn povas ĉeesti kiel observanto.

==========

TRI BELAJ TAGOJ .

Invitita de la Pola Katolika Unuiĝo Esperantista pere de S-to Paruzel, mi ĝojis partopreni, kun S-to Goudé kaj lia fratino, en la tritaga Esperantista Simpozio, kiu okazis en Niepokalanow, sub la alta protekta de Monsinjoro Miziolek, elpepiskopo en Varsovio. Estas notinde, ke li prezidis la lastan kuncelebritan meson.

Niepokalanow signifas "urbo de la Senmakula". Kuŝante proksime de Varsovio, ĝi estas franciskana monaĥejo fondita de S-to Maximilien Kolbe, kiu donis sian vivon en koncentrejo, la 14-an de aŭgusto 1941, por anstataŭi kondamnitan familiestron, kaj ankaŭ fondis "la kavalirojn de la Virgulino".

Kion diri pri tiu simpozio ?
La programo anoncis :
- Esperanto ja la servoj de la Eklezio
- Ekumenismo kaj homaranismo de D-ro Zamenhof
- Esperanto - Latino de novaj tempoj
- IKUE kaj la kavalirismo de B. S-to M. Kolbe

Do, ni aŭdis kvar kontentigajn prelegojn pri diversaj temoj. Pri Esperanto - latino de novaj tempoj prelegis itala sacerdoto, antaŭa profesoro pri latino en malsupera seminario. Estas agrable aŭskulti kompatentan fakulon, kiu bone priparoles la temon. Mi tre deziras, ke tiu prelego estu publikigita. Koncerne la kavalirismon de S-to Kolbe, ni aŭdis esperantan tradukon de prelego de Kardinalo Wynszynski.

Ni ŝatis la ŝercojn de S-to Ciccanti kaj samtempe lian laboron por Esperanto tra la tuta mondo.. Ni aplaŭdis la Evangelian Ensemblon, kiu bonege kantas la Evangelion kun taŭgaj kaj ankaŭ malgrandaj komentoj.

Ĉiutage ni kuncelebris la Meson en Esperanto uzante la freŝdatan misalon, kantis niajn fidon, esperon, amikecon en nia kara lingvo.

Estis multe da libera tempo dum kiu ni povis rilati kun la ĉeestantoj. Persone mi povis multe paroli kun ĉeĥa paroĥestro, kiu feliĉiĝis, ĉar mi donis al li mian esperantan biblion. Longe li rakontis pri siaj vivo, sacerdoteco, laboro, espero. Mi povis ankaŭ interŝanĝi kun du teologoj studentoj, kiuj multe demandis pri Franclando, francaj katolikoj, sacerdotoj, episkopoj. Ili bone konas la francajn metodojn por anonci la Evangelion.

Krome, ni vizitis la apudan malsuperan seminarion en kiu studas almenaŭ sesdek junuloj, la naskiĝdomon de Chopin kaj fine, sed tre rapide, Varsovion nokte.

Plie, mi atentigas pri prelego farita de Jelly Koopmans - Schotanus, kiu partoprenas en la ekumena komitato de KELI - IKUE. La temo kompreneble estis la ekumenismo. Ŝi prelegis laŭ la bonega evangelia maniero legante oftajn bibliajn tekstojn. Ĉu ankaŭ ĉi tie ne estas bona kampo por esperantistoj ĉar ni havas samtempe la saman Evangelion kaj la saman lingvon ?

Kiel konkludi ? Mi nur diros, ke mi ne povas decidi ĉu mi preferis la prelegojn, la fratan etoson, la belegan veteron, la akcepton de miaj novbakitaj amikoj en Poznan aŭ en Niepokalanow.

Dankon, polaj ŝatataj kaj amataj geamikoj. Ĝis baldaŭa revido.

DEGRELLE Roger.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

Protokolo de la konsilia kunvenveno de 13-a de oktobro 1974.

Ĉeestas : S-inoj Michau kaj Vincent, F-ino Vanneau, S-to Degrellle, F-to Marmou, S-roj R. Despiney kaj Ligot.

Senkulpiĝis : S-roj Barrier, Bessière kaj Véron.

.../...

.../...

La kunveno okazis 4 bis, rue de la Cerisaie en Paris kaj estas malfermita per la preĝo "Patro nia ".

I- Pri la protokolo de la lasta kunveno, kiu okazis en Angers, ĉiuj povis ĝin legi en la bultano N° 101; gratulojn al la protokolinta S-ro Bessière !

II- Pasintaj okazaĵoj : la kongreso estis bona. La memorigo pri ĝia sukceso ĝojigis la konsilianojn. La sekretario legas leteron de "Karmelo de l' Paco", kiu preĝis por la kongresanoj. Plie niaj evangeliaj fratoj bone raportis pri la kongreso en siaj bultenoj.

- Pri la internacia kongreso IKUE-KELI, Frato Marmou rimarkigas, ke tiu spirita semajno en Hamburgo estis tempo de preĝo kun la Sankta Biblio centre de ĉiuj, kiuj sin sentis vere fratoj. Li ankaŭ substrekas la progreson de kongreso al kongreso.

- Diservo okaze de ĝemeliĝo inter Le Perreux kaj Forchheim. Nia sekretario rajtis prelegi esperantlingve dum la diservo antaŭ multaj ĉeestantoj. Poste, li disdonis foliojn kun siaj vortoj en Esperanto, la franca kaj la germana.

- Letero estas sendita al la Dekano de la 4-a distrikto en Paris por informi lin, ke nia asocio nun kunvenas sur la teritorio de la paroĥo S-ta Paŭlo.

III- La bulteno : Pro la plialtigo de la paperprezo, la nombro de la paĝoj estos limigita je ok. Artikolon alterne skribos niaj religiaj konsilantoj : S-toj Bourdon kaj Degrelle.

IV- Financoj. Ilia nuna stato estas sana, sendeficita. La kotizo, kiu statute estas sana, sendeficita. La kotizo, kiu statute estas ligita kun la prezo de la afranko altiĝos ĝis 8 Fr-. Propono por duontarifo koncerne sacerdotojn kaj religiul(in)ojn estas unuanime akceptita. La kasistino invitas la anojn, kiuj elpezis por informado, sendi al ŝi la repagotajn fakturojn.

V- Laborplano 74-75. La temo estas : "Malfermi kursojn". Artikolo aperos en la bulteno por konsili la kuraĝulojn dezirantajn sin ĵeti en la akvon!

VI- Kongreso FKEA 1975. La sekretario interrilatos kun S-to Baudry en LILLE

VII- Diservo dum UFE-Kongreso en Tours. Oni antaŭvidis kontaktojn kun esperantistoj de tiu urbo. Dank'al rimarko de S-ro Amouroux, oni scias, memortabulo pri S-to Peltier estas videbla apud Tours.

VIII - Diversaĵoj. S-to Degrelle sciigas, ke li ĉeestos la tritagan Esperantan simpozian organizitan de S-to Paruzel en Pollando. Nia asocio sendos al la ĉeestantoj salutleteron.

S-ino Vincent informas nin pri Radio-Rama, kiu elsendis pri nia kongreso en Angers. Sekve, oni decidas senpage sendi la bultenon al D-ro de Salvo, aganto ĉe Radio-Roma.

- La konsilianoj interŝanĝas ideojn pri diversaj manieroj trafi altajn ekleziajn instancojn okaze de niaj kongresoj.

- IKUE-kongreso 1975 okazos en Romo. Estas sukstrekinda la koincido de la kongreso kun la Sankta Jaro. (-11-16 de Aŭgusto 1975)

La kunveno finiĝas je la 16.30 per danka preĝo.

Protokolis : R. Despiney.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

36-a kongreso de IKUE en Romo (Domus Pacis) : 11-16- VIII - 1975-

LKK : P. Giacinto Jacobitti
Piazza S. Maria Maggiore 8
00185 ROMA Italujo

Poŝtĝirkonto 1/37638.

Skribu al li por peti la aliĝilon.

aliĝkotizon :
it.liroj 13.000 ĝis la fino de marto
it.liroj 16.000 ĝis la fino de junio.

NACIA KONGRESO DE FRANCA KATOLIKA ESPERANTO-ASOCIO

LILLE (Pentekoste) de Sabate, la 17-an ĝis lunde, la 19-an de Majo 1975

Kongresejo : Centro de la Dominikanoj, 7, avenue Salomon, Lille.
en Parko Monceaux, apud St-Maur.

PROVIZORA PROGRAMO :

Sabaton 17-an de Majo

17 h. Akcepto de la Kongresanoj. Interkonatiĝo.

Ekspozicio pri Esperantaj libroj kaj revuoj (S-ro L. GILOTEAUX)

19 h. - Vespermanĝo

20 H. - Teilhard de Chardin kaj la lingvo Internacia(Patro G.BAUDRY)

Dimanĉon 18-an de Majo

(8 h. matenmanĝo)

9 h - Agad-kaj financa raportoj de la Asocio.

10 h- Historia Skizo pri la agado de la Dominikanoj en la mondo (Patro L. BOURDON)

11 h 30 - Diservo (La ĉeestantaj Patroj)

12 h 30 - Tagmanĝo

Posttagmeze : komentata vizito en esperanto de la vîdindaĵoj (historiaj monumentoj kaj artaj trezoroj) de la urbo LILLE (L. BOURGOIS)

19 h Vespermanĝo

20 h. Distra kunveno.

Lundon 19-an de Majo

8 h. Matenmanĝo

9 h. Fino de la kongresaj kunvenoj kaj konkludo.

10 h. Tuttaga ekskurso al BRUGES : detaloj en la venonta bulteno.

Aliĝkotizo :	10 Fr-	10 Fr-
Restad-prezoj :	Vespermanĝo	10 Fr-
	Tranoktado kaj matenmanĝo	18 Fr-
	Tagmanĝo	12 Fr-

N.B.- Eksterlandanoj estos bonvenaj.

Por pliaj sciigoj, aliĝoj kaj pago, oni turnu sin al :

Patro L. BOURDON
7, avenue Salomon
59000 LILLE

Tel.(lunde kaj marde matene)
- 55.00.82.-

C.C.P.- L. Bourdon, Lille, 1909-49-

Limdato de la aliĝoj : la 17-an de Aprilo.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

REPACIĜO : ĉu pasema sento aŭ longa marŝo ?

Repaciĝo, kiu estas esence rekomunikiĝo post tiuj disiĝoj, nome : niaj pekoj, ne povas limiĝi al mallonga momento de fervoro, al pasema emocio. Ĝi signifas elano, marŝo eĉ longdaŭra marŝo. Ĝi estas unue marŝo entreprenata sub la potenca allogado de Dio, Nia Patro, kiu mem la unua ekmarŝis en nia direkto. Kiel por la "erarinta filo", la Patro venas renkonte al ni : "ĉio estas de Dio, kiu repacigis nin kun Si mem" (2 Korintanoj, ĉapitro 5, versegoj 17-21)

Dum nia tuta vivo kaj tio ne estas tro ! - ni tiel antaŭeniras laŭ spirita marŝo, laŭ longdaŭra progreso je plia kredo kaj amo. ĉu ni ne deziras respondi kiel eble malplej malbone, eĉ plej bone, al la nekunmezureblaj Saĝeco kaj Amo de Dio al ni ?

.../...

.../...

Helpas, gvidas nin Tiu, Kiu estas la Vojo mem, ĉar, laŭ la Apostolo : "Per Kristo","enKristo","nome de Kristo" ni vojiras al la Patro. Jesuo orientas nin per sia neerarebla Parolo; Li kuraĝigas nin per la Sep Signoj de sia repaciga agado, la Sakramentoj.

Tiu marŝo kun Kristo, la Savanto de l'Mondo povas esti nur epa marŝo : "en Kristo, Dio repacigis la mondon kun si mem". La invito de Kristo : "Unue iru kaj repaciĝu kun ĉia frato" indikas la fratan klopodon plenumendan antaŭ ĉia elano al Patro.

Alian kondiĉon ni malpli primeditis : repacigi nin kun ni mem, ne preterlasi nian orientiĝon al la Patro. Kiel resti fortaj kaj certaj dum nia marŝo, se nia interna reglando estas dividita ? Kiel atingi la Patron, se ni sinsekve laŭiras alidirektajn eĉ kontraŭdirektajn vojojn ?

La kelkaj ĉi-supraj pripensoj prilumas la gravecon de la Sankta Jaro : ni eniras la longdaŭran marŝon de la tuta Homaro, tra jaroj kaj jarcentoj, en la direkto al la nelaŭgeble bona Patro.

Louis BOURDON o.p.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

NIA MEMBRARO

Membroj subtenantoj 1975 : 1) S-ro BESSIERE (I-&-V).
Novaj membroj 1975 : 1) S-ro ROBIOLLE (Hts de S): 2) S-ino BONNET (Eure)

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

LINGVA ANGULO

Post la apero de la oktobra numero alvenis novaj tradukoj de S-ro Lecroisey :

1) vigle bati iun; 2) troigi sian parton; 3) ĉiutage pli kaj pli fiaski; 4) tutklare diri ion al iu; 5) ĉi tie estas neniu; 6) bonvole siajn erarojn ripari; 7) estas diablo en la skatolo; 8) longdaŭre esperi sian vicon; 10) sendifekte esperi.

Eraro : en n° 102, respondo 1 : Anstataŭ "trapasi", oni legu "transpasi".

Respondojn al la oktobraj proponoj sendis S-ro Bourgois (B) kaj S-ino Michau (M).
1) malmilde trakti, superŝuti per riproĉoj, skoldegi (B); rafinate aranĝi (M).- 2)alveni kun sia tuta armilaro kaj ekipaĵo (B); alveni trafe ekipita (M).- 3) trabatadi sin en la vivo, perŝviti sian socian promocion (B); sukcesi memhelpate (M).- 4) kompletigi la ĉiumonatan enspezon (B); sekurigi buĝetan ekvilibron (M).- 5) priparoli sian prefaratan temon, flegi sian hobion (B).- 6) firmigi sian regadon (B); firmigi sian influon, prestiĝon (M).- 7)dispono pri la profitoj (B); profitiga afero, nekontrolebla profito (M).- 8) li estas ja mondomaĝema (M).- 9) certigi al si apogon (B); defende atendi ĉian ekazeblaĵon(M). 10) rezignacie elporti humiligojn (B); esti facile trompeble(M).

Gratulon al S-ro Bourgois !

* * *

Novaj proponoj de S-ro Bourgois : 1) baigner dans la joie; 2) bailler comme une carpe; 3) être dans le bain; 4) un bandit de grand chemin; 5) faire son bas de laine; 6) il a son bâton de mar échal; 7) se battre contre la montre; 8) bavard comme une pie; 9) baver des ronds de chapeau; 10) se faire une beauté.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

PROTOKOLO DE LA KONSILIA KUNVENO DE LA 8-a DE DECEMBRO 1974.

Ĉeestis : S-ino Vincent, F-ino Vanneau, F-to Marmou, S-roj Colas kaj R. Despiney.

.../...

.../... senkulpiĝis : S-ino Michau kaj S-ro Ligot.

Pro la striko de la poŝtoficistoj kelkaj el niaj konsilianoj povis nek ĉeesti nek senkulpiĝi.

Kiel kutime preĝo malfermis kaj fermis la kunvenon, kiu okazis en la sidejo de U.F.E., 4 bis, rue de la Cerisaie en Parizo.

1)- La protokolo de la lasta kunveno estis unuanime akceptita.

II- Pasintaj okazintaĵoj

a)- Por kvitanci nian salutleteron al la partoprenantoj de la Simpozio en Pollando, S-to Paruzel sendis al ni dankan telegramon.

B)- Agado ĉe "PAX CHRISTI" : Nia ĝenerale sekretario interparolis kun S-to Le Henaff, unu el la respondeculoj de tiu movado. La argumentoj prezentitaj estis bone akceptitaj de S-to Le Henaff, kiu invitis S-ron R. Despiney aperigi artikolon pri esperanto en "Le Journal de la Paix".

C)- Okaze de la oficialaj ĝemeliĝaj ceremonioj en Forchheim(Germanujo esperantista amiko de Nurenbergo disdonis 300 foliojn, sur kiuj estis presita la taksto jam disdonita en Le Perreux (Francujo)

III - Diservo okaze de la nacia kongreso de UFE en Tours (1975).

S-ro Motillon respondis al nia letero indikante, ke S-to Boulmer jam klopodis por aranĝi ekumenan Diservon.

IV- Nia jarkongreso en Lille.

Pro la freŝdataj sociaj eventoj, la unuaj rilatoj inter Pastro Baudry kaj nia ĝenerala sekretario estis nuligitaj.

Ek de la fino de la PTT-striko denove okazos la interrilato inter tiuj du personoj.

V - Nia bulteno -

Pro la striko, la protokolo de la oktobra kunveno aperos kun tiuĉi protokolo en la venonta bulteno.

Oni sugestas, ke iafoje aperu eltranĉaĵoj de alilandaj katolikaj ĵurnaloj.

La venonta konsilia kunveno okazos la 2-an de Marto 1975, je la 14.30, 4 bis, rue de la Cerisaie - Parizo; Metro : Bastille.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

I N F O R M O J .

Dimanĉe la 22.09.74, tri fraŭlinoj el Sartrouville kaj unu el Mareil-Marly, oficiale konsekris sian vivon al Kristo.

En la preĝejo St-Joseph en Sartrouville, dum la solena meso celebrita de la Prefekto de la Sankta Kongregacio por la Orientaj Eklezioj, kaj la ĉeesto de la "Patrino" de la Hispana sekurala ordeno "Madeleine Aulina", la konsekritoj promesis per voto aparteni al tiu ordeno.

Alia fraŭlino el Sartrouville petis oficialoan membriĝon.

Senoritas, tie, la nomo de la kongregacianinoj, el Francujo, Hispanujo kaj Italujo, kaj multaj geparoĥanoj partoprenis la feston.

Unu el la kvar konsekritoj, Senorita L.G. kuraciststudentino lernis Esperanton, kaj ricevis la unuan gradan diplomon en Grésillon en 1968.

Ni deziras al la novaj Senoritas fruktoriĉan vivon en Kristo.

J. K.

xxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxxx

D I S T R A A N G U L O .



HORIZONTALE / 1) tia povas esti koliko; trinkaĵo (R).- 2) Ventego; litero.- 3) ĉar eble li vidis maloftan vidaĵon.- 4) Pronomo; bongustan maran beston.- 5) tualetilon ne uzatan de knabinoj.- 6) vosto de 2 vertikale; por tre juna gastronomo (R).- 7) Malamigi.- 8) epiteto por samideanino.- 9) Tia estas plej ofte hundopiedo.- 10) Celo de la serĉ esploro (R); necesa parto de la dua 3 vertikale.

VERTIKALE : 1) Restu bon.... (konsilo al kondukanto); trinkaĵo (R).- 2) pika kamparbesto; malfeliĉe !.- 3) franca urbo; veturilo. (R).- 4) Efiki; svisa rivero.- 5) verko de aŭtobiografianto.- 6) tiu parto ne pereos; se lumo malaperas, ankaŭ ĝi (R). 7) internacia organizo; kontraŭa.- 8) sufikso; konjunkcio; sufikso.- 9) Komenciĝo de l'arto; frukto (R).- 10) bova nutraĵo (R); senescepte.

Jean LIGOT.

xxxx